

La vakcin-kandidato de Kubo kontra? dengo havas sekuran platformon, diras spertuloj



BioCubaFarma kun esploristoj de CIGBCuba kontrolas progreson de dengo-vakcinkandidatoj

Havano, mar 22 (RHK) La CIGB (Centro por Genetika In?enierado kaj Bioteknologio) en Havano raportis ?i-marde, ke la dengo-vakcino-kandidato ellaborata de Kubo havas sekuran teknologian platformon ?ar ?i bazi?as sur rekombinaj proteinoj.

La profilo de la institucio en Tvitero indikas, ke "Ni havas kvarvalentan kandidaton, bazitan sur proteinoj de la kvar dengo-virusoj, kiujn ni taksas nuntempe."

Se eblas malaltigi la nivelon de infekto de dengo-viruso -tio estas, la viruso- oni evitas severecon; e? la simptomojn.

"Je tio ni vetas kun la vakcino-kandidato, kiun ni disvolvas: ke la malsano estu subklinika a? kun mildaj simptomoj", komentis la CIGB en la socia reto.

Akiro de la vakcino estas kompleksa procezo ?ar dengo havas kvar serotipojn kaj necesas imunigi kontra? ?iu el ili samtempe, por ke la produkto estu efika.

Same, en la da?ro de 2023 devus esti disponebla nova rapida diagnoza sistemo por dengo, en kiu laboras specialistoj de la Imun-testa Centro.

En deklaroj al la ?urnalo Granma, Eduardo Mart?nez, prezidanto de BioCubaFarma (Komerca Grupo de Bioteknologijaj kaj Farmaciaj Industrioj) argumentis, ke ?i tiu sistemo ebligas determini, ?e la apero de la unuaj simptomoj, ?u temas pri dengo a? dua infekto.

"?i tio servos por apliki diferencigan traktadon al pacientoj, kaj eviti plimalboni?on de la malsano kaj morto", aldonis la sciencisto.

Fonto: PL

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/salud/317356-la-vaksin-kandidato-de-kubo-kontrau-dengo-havas-sekuran-platformon-diras-spertuloj>



Radio Habana Cuba